
# Ktp!

LA REVUO DE USONA
ESPERANTISTA JUNULARO

Vol. 02, N-ro 01
Novembro-Decembro 1994





**HAPPY FIRST ANNIVERSARY!**
Ktp! ENTERS ITS SECOND YEAR WITH THIS ISSUE!

*As USEJ enters 1995, I'd like to quickly thank some of those kind people who have been vital to our organization.*

*Our Thanks to ...*

*—the gracious souls who continue to lend a financial hand to USEJ.*

*—Ionel and Miko at ELNA's Central Office, for everything they do for us.*

*—all those thoughtful people who simply took the time to send a contribution to* KTP! *or just jot an encouraging note.*

*—all the volunteers for USEJ, whether they be board members, staff members of* KTP!, *or local club activists.*

*—everybody who doesn't fall into one of the above named categories . . . "so many names, so little space"!*

*—finally, YOU! What would USEJ be without "u"? (I know... bad joke)*

*Ĝis poste,*

**Joĉjo Truong**


# KTP!

624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554


Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the authors and not of USEJ or the Editor.

Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuaĵoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoroj kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.

*For membership information, contact:*

**USEJ**
**624 Second St.**
**Lancaster, PA 17603-5114**
**(313) 393-4273**
**or**
**ELNA**
**PO Box 1129**
**El Cerrito, CA 94530**
**(510) 653-0998**

## What's inside....


**Baleno, a short story by Daniel Cuthbert . . . . . . . . 3**

**Purigi la Oficejon . . . . . . . . . 4**

**The Rediscovery of North America in the Esperanto youth movement . . . . . . . 5**

**Lingva Angulo . . . . . . . . . . . 6**

**Bennem . . . . . . . . . . . . . 6**

**The Secret to a Happy Life . . 7**



*Redaktora/Editor:* Jozef Truong
*Artaĵoj/Art:* Matthew Horton
*Kompostisto/ Layout:* Sybil Harlow

*Limdato de v.II,n-ro3: la 15a de marto*
*Deadline for v.II,#3:* March 15


## Calendar of upcoming events


**March 17-19**
La Junulara Esperantista Semajnfino
Celebrate 2.5 years of USEJ in Lancaster, PA
Contact USEJ's Central Office for more info

**July 15-18**
43rd ELNA Congress
Esperanto and the International Community in New York
Contact ELNA's Central Office for more info

**July 31-August 7**
51st Internacia Junulara Kongreso
"Aktivismo: Junularo, kiu ne nur dancas"
Contact Voyaĝ-Servo for more info

# BALENO

*This is a fable written by our member Daniel Cuthbert which appeared recently in an issue of Kontakto (no.142, pg.16) Congrats, Daniel, for having your story published! We hope that other readers will enjoy it as well.*



Antaŭ multaj jaroj, kiam la afero estis juna kaj la homaro ankoraŭ ne estis kreita, vivis en la vasta oceano granda Blua Baleno. Tiu ĉi baleno havis gigantajn proporciojn — verŝajne la plej granda estaĵo iam vivinta sur la Tero. Dum jaroj ĝi naĝis tra la oceano sub la malhele griza ĉielo. En tiuj foraj tagoj la ĉielo estis ŝtonkolora kaj, kvankam la oceanoj estis vivohavaj, nur iom da lumo penetris la surfacon de la maroj.

Tiu grizkolora ĉielo perpleksigis la balenon, ĉar ĝi ne povis kompreni kial tiel bela mondo devas kuŝi sub tiel malgaja ĉielo. Tiu ĉi problemo mirigis la balenon kaj, kiam ĝi maljuniĝis, iĝis la ĉefdemando de ĝia ekzisto. Balenoj estas, kiel vi sendube scias, filozofoj kaj bestoj pli aĝaj kaj saĝaj ol ni. Kaj tiu ĉi baleno estis vera majstro de logiko.

Post jardekoj da meditado, ĝi trovis respondon al sia problemo. Dio (tiu ĉi baleno kredis je Kreinto) estis estaĵo de multaj talentoj kaj oficoj. Li kreis la mondon, en kiu la baleno vivis, kiel projekton flankan de io pli, pli granda .... kvazaŭ ŝatokupe, se vi tiel preferas. Li ne havis sufiĉe da tempo fini la planedon kiam pli urĝa afero subite alvokis Lin. Parton de la Tero, la ĉielon, Li ne sukcesis fini. Li apenaŭ havis tempon por krei la balenon, kiu devus fini la takson.

Nun la filozofiema baleno havis ne nur respondon pri la koloro de la ĉielo, sed ankaŭ kialon por sia propra esteco kaj granda saĝeco. Ĝi estis metita sur la Teron, kvazaŭ Dio, por fini tion, kion tiu mem ne povis fini.


La baleno nun havis celon, kaj komencis pensi, kiel trovi la solvon. Kompreneble, ĝia Kreinto volis, ke la ĉielo bluiĝu. Pro kiu alia kaŭzo Dio estis farinta la balenon mem blua? Tio estis signo la baleno ja sciis, ke la akvo en kiu ĝi loĝas estas preskaŭ de ĝia sama koloro, kaj ke ĝi havas truon sur la pinto de sia kapo, tra kiu ĝi povas pafi akvon. La belecon en tiu ĉi ideo la baleno tuj vidis — ĝi farbus la ĉielon blua, per akvo kiel kolorilo kaj si mem kiel peniko!

Ĝi plonĝis al la fundo de la maro kaj malfermis sian kavernan buŝegon, enbuŝigante tiom multe da akvo, ke la oceanoj retroiris de la bordoj. Dum ĝi naĝis surfacen, ĝi pliigis la premon ene de si kaj tiam, kun sono de miliono da kanonoj, ĝi ekblovis la akvon de sia blovtruo ĉielen. La blua fluo akva iris supren, supren, supren kaj tiam, frapinte la grizan kupolon, sterniĝis ĉien ĝis kovris la tutan ĉielon per mirinda blua kolornuanco.

Kaj tiel, miaj amikoj, estas kial la ĉielo estas blua, balenoj sprucigas, kaj akvo falas de supre.

Daniel Cuthbert

Guilford



# Purigi la oficejon

Adiaŭ, 1994! Saluton, 1995! Ankaŭ ni sekvas tiun malnovan tradicion purigi la oficejon antaŭ ol venas la nova jaro, por certigi sukcesplenan jaron. Jen diversaj aliaĵoj, kiuj eble interesos vin. . .

◆◆◆

USEJ celebros sian 2.5an datrevenon en marto 1995. Do, venu al Lancaster festi kun ni! La Junulara Esperantista Semajnfino okazos de la 17a ĝis la 19a de marto, 1995, en Lancaster, PA. Aliĝiloj jam estis dissenditaj de ELNA en novembro. Ili ankoraŭ haveblas ĉe USEJ. Por pli da informo, kontaktu Jozef Truong ĉe la Centra Oficejo de USEJ aŭ ĉe (717) 393-4273.

◆◆◆

Por pli vojaĝemaj E-istoj, pripensu ĉeesti unu el ĉi tiuj kongresoj, kies aliĝiloj nun haveblas ĉe USEJ:

La 51a Internacia Junulara Kongreso okazos inter la 31a de julio kaj la 07a de aŭgusto, 1995, en Sankt-Peterburgo, Rusio. Kiel kutime, Esperanto Vojaĝ-Servo povos helpi multe plifaciligi vian vojon tien.

La temo ĉi-jare estas "Aktivismo: Junularo, kiu ne nur dancas" (kvankam oni rajtas danci dum la IJK). Laŭdire, la organizantoj (kiuj famas pro organizi la grandegajn rusajn junularajn tendumadojn) atendas almenaŭ 800 ĉeestantojn!

◆◆◆

Nepalo (!) gastigos la 1an Internacian Himalajan Renkontiĝon, de la 26a de februaro ĝis la 9a de marto, 1995. La IHR plaĉos al la vere aŭdacaj junuloj! Krom viziti ekzotikan Katmandon (la ĉefurbon), vi havos okazon piedmarŝi en la famaj altegaj montoj de Nepalo, flosi super la rapide fluantaj riveroj, kaj ĝui unu el la plej misteraj kaj ankoraŭ nogastemaj kulturoj en la mondo.

◆◆◆

Ĉu Michael Jackson parolas Esperanton? Jes kaj ne. Muzikvideo pri lia nova kasedo "History", aperonta ĉijare, uzas Esperanton kiel unu el la ĉefaj lingvoj. En la video, Jackson savas la mondon el kvazaŭ komunista armeo. Kiel la mondo reagos al la video? Ni vidos . . . .

◆◆◆

Bonaj novaĵoj venas pri alia fama homo (nu, se vi studas aktive ekonomikon . . . ) Profesoro Reinhard Selten, aktiva Esperantisto en Germanio, estis unu el gajnintoj de la 1994a Nobel-Premio pri Ekonomiko.

Laŭ "Sferilo" (novaĵletero de la San-Franciska Esperanta Organizo), li estas la kvara Esperantisto, kiu gajnas iun Nobel-Premion. Ni interesas scii, kiuj estas la aliaj tri?

◆◆◆

Kial ne finu ĉi tiun numerom per tre taŭga kanto, kiun vi ja konas bone. Ĝi venas el tre interesa kantlibro tajpita de JEN, Jenulara Esperantista Nordamerika (la antaŭa junularo en Usono!) en 1960aj jaroj. Kantu tutkore kaj tutnokte . . .

### PASINTAJ TAGOJ
### (AULD LANG SYNE)

Malnovajn gekonatojn iam
Ĉu forgesu ni?
Ĉu tagojn la pasintajn ĉiam
Ne memoru ni?

Feliĉan tempon la malnovan
Ne forgesu ni!
Ni kune trinku tason ravan
Al frátharmoni'!

Ĉe l'karaj lekantetaj valoj
Ĝoje kuris ni;
De tiam multaj lacaj horoj
Glitis preter ni.

ĜIS REVIDO EN 1995



## Christopher Columbus Strikes Again:
## The Rediscovery of North America in the Esperanto youth movement

*Unue, la kebekiaj junuloj okazigis la 48an IJK-n. Poste, USEJ renaskiĝis. Ĉi-jare, la kanada junularo refondiĝis. Dum la pasintaj kelkaj jaroj, la junulara movado en nia kontinento multe kreskis. Jes, estas ekscita tempo por junaj Esperantistoj en Nordameriko nun.*

Only five short years ago, North America remained one of the only places in the world where young Esperantists were pretty much left to fend for themselves.

But the young Esperantist movement in North America was rediscovered in 1992 (which, by coincidence, happened to mark the 500th anniversary of the discovery of North America itself), when Québec played host to the 48th IJK in Montreal. The entusiasm spread south, and USEJ was created that same summer.

Now, the movement here takes another giant leap forward with the re-creation of a Canadian national young Esperantist organization and the reorganization of the Québec association.

Junulara Esperantista Kanado (JEK) has represented Canada in TEJO since 1976, but little has happened since it was accepted. The last work of JEK was planning a program for young people at the 69th World Congress in Vancouver in 1984—ten years ago! Now under the direction of Bruce Arthur and Luc Goulet, the organization has a chance to continue what was started nearly two decades ago.

Because its small membership is spread throughout all of Canada, JEK isn't planning too much for its first year. However, it has already started printing its own newsletter, Juna Alumeto, which is sent out by its parent organization, Kanada Esperanto-Asocio.

Despite hosting the world convention, the Kebekia Esperantista Junulara Organizo (KEJO) was farily inactive during the past two years, primarily because most of the young people in Québec were involved instead with the Esperanto - Societo de Kebekio, the provincial adult association.

However, a small group of young Esperantists recently came together to revive the organization once again. With a newly elected three-person board lead by Patrice Germain and a newsletter of its own, Juna Lilio, KEJO has already planned an ambitious year, which included a masquerade ball on Halloween and a Christmas party.

USEJ has working relations with both organizations, but grandiose projects aren't being planned . . . yet! Of course, since Québec is so close to the northeastern United States (where many of USEJ's members live) frequent, regional conferences and weekends between USEJ and KEJO are very possible. But who knows? At the rate the movement is progressing, the IJK just may return to North America some time soon.


*Have a question? Want to know more about the Canadian movement? Here's who to contact:*

| | |
|---|---|
| Bruce Arthur | Patrice Germain |
| Prezidanto, JEK | Prezidanto, KEJO |
| Box 61 | 1856 Montee Monette |
| Grenfell SK Canada | Laval PQ Canada |
| S0G 2B0 | H7M 3V5 |

# Lingva Langalo

Oni prononcas serbajn vortojn kvazaŭ ili estas en Esperanto. Do, se vi bone prononcas Esperanton, tiam vi povas prononci bone ankaŭ la serban! Ĉikaze, ni aldonas la prononcon — kun akcento eĉ — por tiuj, kiuj ne bone parolas Esperanton. Korajn dankojn al Zoran Ĉiriĉ de Niŝ

| Esperanto | Serba Lingvo | Prononco |
|---|---|---|
| Saluton! | Zdravo! | zdravo |
| Bonan Tagon! | Dobar den! | dobar den |
| Kiel vi fartas? | Kako ste | kako ste |
| Mi fartas bone. | Ja sem dobro. | ja sem dobro |
| Mi fartas malbone. | Ja sem lose. | ja sem lose |
| Mi fartas sufiĉe bone. | Ja sem dosta dobro. | ja sem dosta dobro |
| Mia nomo estas . . . | Moje ime je . . . | moje ime je |
| Mi nomiĝas . . . . (pli kutime uzata ) | Zovem se . . . | zovem se |
| Ĉu vi parolas E-on? | Da li govorite esperanto? | da li govorite esperanto |
| Dankon! | Hyala! | hyala |
| Mi amas vin | Volim te | volim te |



# THE SECRET TO A HAPPY LIFE

During the past few years, there have been thousands of books, articles, news programs, seminars, and tapes on how to find happiness. Despite the claims (and huge prices), most of the items just don't work.

But now, you will finally be able to discover the key to happiness and peace: A YEAR MEMBERSHIP IN USEJ!

### Really ... We're Not Kidding

What? How could a year membership in USEJ bring you happiness? Let us count the ways:

First, you'll be proud that you've done a small part towards making the world better. Through your membership, you are helping to spread the word about Esperanto to young people throughout the United States (and beyond!), so others can find out how great Esperanto is. Let's face it- by simply joining USEJ, you're already changing the world.

### But That's Not All, Folks!

As if that weren't enough, you'll even be able to enjoy and use Esperanto through several of the services of USEJ.

You'll look forward to every exciting and jam-packed issue of KTP!, the official newsletter of USEJ. Each of the six bimonthly issues will arrive conveniently at your doorstep or mailbox, bringing you plenty to read. National and local news, "lingva angulo", feature articles, games, and "BENNEM" are all waiting for you in each issue.

If receiving one magazine isn't enough for you, then you'll probably use USEJ's Postal Library. This free service for USEJ members, which offers issues of more than ninety magazines and newsletters from around the globe, allows you to borrow a wide range of periodicals in and about Esperanto.

New friends and wonderful memories await you at conferences for young Esperantists that take place each year. USEJ is helping organize several weekend conferences for 1995, so becoming a member of USEJ will give you a chance to participate.

And, on top of these and other services offered by USEJ, you'll also get the benefits of membership in ELNA, including the discounts at ELNA's well stocked Book Service and issues of Esperanto USA!

### 27 Or Older?

Have no fear if you're reaching (or already past!) your 27th birthday. By becoming a Patron of USEJ, you will still be able to be a part of USEJ's work. Simply contribute at least $10 directly to USEJ (see below) and you'll receive many of the same services that other USEJ member enjoy.

### Use Your Membership Wisely


Remember — you only get as much from your membership in USEJ as you put into it. So, you can remain a passive member and only nominally support USEJ. Or, you become an active member and actually help create a better organization!

We're always on the lookout for a few good men (and women) of all ages and skills. In addition, 1995 will be an election year for USEJ, so several positions in USEJ's Executive Board will be open! There's no better chance to let your voice be heard, as well as work for a national your organization. Contact us at the Central Office of USEJ for more details... and keep your eyes open the next few months for more info!


### Operators Are Standing By

Contact USEJ's Central Office for more information on membership, services, questions. Contributions and donations can be made directly to "Usona Esperantista Junularo" and sent to USEJ's treasurer, Nathan Treadway, at: 3769 South A Street, Richmond IN 47374.

KTP!
624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554



Baleno, an original story by one of our members



*Inside this month's issue:*

- ★ *News about the Canadian Youth movement*
- ★ *BENNEM*
- ★ *The Secret to a Happy Life*
- ★ *And much more . . .*

*So celebrate the second year o*
***KTP!*** *with us*